

# Frat' fraton atakas ŝakale

Pro la konkero de la tuta Hispanio fare de la frankisma armeo, helpita de la itala faŝismo kaj la germana naziismo, la esperantista aktivado ĉesis en la tuta lando kadre de tiu plorinda situacio en kiu dronis ankaŭ la hispana demokratio kaj kulturo.
Sed la katastrofo por Esperanto, la kulturo kaj la homaro ĝenerale ne limiĝis al la hispana teritorio. La eŭropaj demokratioj kiuj spektis senintervene la masakradon de la hispana Respubliko fare de la faŝismo devis siavice suferi agresadon de la samaj faŝismaj potencoj. En septembro de la jaro 1939, malmultaj monatoj post la finiĝo de la his-pana milito, komenciĝis nova Mondmilito en la 20a jarcento.
Tiu Dua Mondmilito estis tiom brutala kaj pli longdaŭra ol la Unua. Estis en ĝi pli da viktimoj ol en la antaŭa kaj krome intervenis en la batalado pli da landoj. Ankaŭ la armiloj estis pli potencaj; la milito finiĝis en la jaro 1945 per la eksplodigo de du atombomboj ĵetitaj sur japanaj urboj. Sed estis en ĉi tiu milito iu novaĵo kiu meritas apartan atenton. Temas pri la rasismo, rasmortigo, la koncentrejoj por la ekstermo de etnioj kiel la ciganoj kaj ĉefe la judoj. En Germanio aperis tiu stranga varianto de faŝismo, kiu emfazis teorion de supereco de la propra germana raso kaj asignis al ĝi la taskon gvidi la mondon kaj malaperigi rasojn kaj etniojn kiuj ne kongruas kun tiu rasisma doktrino. Rezulte de tiu freneza politiko estis mortigitaj preskaŭ ses milionoj da gejudoj.
Ne estas la celo de ĉi tiu raporto priesplori kiel povis aperi tia hororaĵo kaj barbareco en klera kaj civilizita lando kia Germanio. La sociologiistoj kaj psikologiistoj pri amasmovadoj havas antaŭ si la gravan kaj malfacilan taskon klarigi tion, kaj fakte ekzistas multaj verkoj kiuj pritemas tiun aferon kvankam ŝajnas ke ankoraŭ oni ne alvenis al ia definitiva konkludo. Ankaŭ ne estas nia tasko priskribi la batalojn kaj la politikajn aspektojn de la Mondmilito. Ekzistas multe da historiaj verkoj kiuj priskribas ĉiujn aspektojn de la konflikto kaj ties disvolviĝo.

Kio, jes ja, koncernas al ni estas mencii la gravan damaĝon kiun la nova konflikto alportis al la tutmonda esperantista movado. Dum la militaj jaroj aperis eĉ ne unu sola gazeto esperantista. La movado ĉesis funkciadi, ĉefe en Eŭropo, kie la esperantismo pli estis disvastiĝinta ĝis tiam. Tiu milito estis signo de la fiasko de ĉiu porpaca kaj progresema ideo, kia Esperanto pretendis esti. Tiu periodo estis nigra nokto ĉirkaŭ ni.
Dume en Hispanio persiste regis neracia ŝovinismo, persekuto kaj timo. Malaperis ĉiuj esperantistaj rondoj, escepte **Frateco** de Zaragozo, kiu, kvankam oficiale ĝi ne malaperis, tamen, ne povis dum tiuj jaroj organizi E-kursojn. Nur de tempo al tempo la estraro kunvenis en la sidejo de la asocio. La 10an de novembro de la jaro 1941, je la oka horo vespere, estante la Prezidanto Orós kaj alia estrarano atendante la alvenon de la ceteraj estraranoj, alvenis dudeko da junaj membroj de faŝista organizaĵo kaj rompis kaj detruis ĉion, forprenis la arkivon kun libroj kaj dokumentoj kaj fine arogante foriris trankvile. Kvankam estis prezentita denunco pri tiu banditaĵo estis neniu respondo el la Provincestro, kion interpreteblas kiel aprobo aŭ komplica konsento fare de la aŭtoritato.
En tiuj jaroj la ŝovinismo kaj agresemo evidentiĝis tre ofte en nia lando. Tiu kontraŭkultura etoso kreita de la naciismaj teorioj de la milit-venkintoj radikaliĝis ankaŭ kontraŭ Esperanto kaj ĝenerale kontraŭ ĉio kio signifis eksternaciaĵon: liberalismo, internaciismo, demokratio, socialismo, progresemo, liberpenso…
En la militantaj landoj, ĉefe en la eŭropaj, landoj okupitaj de la germana armeo, al la malfacilaĵoj de la milito mem oni devas aldoni la persekutadon. Ni jam menciis la masakradon de la juda popolo. Similan persekutadon suferis la komunistoj, socialistoj kaj maldekstruloj ĝenerale, kaj inter ili spe-iale la geesperantistoj. En la naziaj koncentrejoj, inter multaj miloj da judoj mortis ankaŭ la geparencoj de L.L.Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. Liaj du filinoj, Sofia kaj Lidia, mortis en